**En la jaro 2017, dum nia 58-a Argentina Kongreso de Esperanto (Urbo Crespo – Provinco Entre Rios) mi faris prelegon pri:**

**“Antikvaj simboloj / Novaj Simboloj”**

**kaj paralele, nia AEL-Prezidanto Gabriel Wagner faris serion da prelegoj pri la temo:**

**“ Ludu kaj Lernu” .**

**Mi do, planis tiun ĉi prelegon kiel natura daŭrigo de la menciitaj du temoj.**

# ”LUDU PER STENOGRAFIO (ŜPARU TEMPON KAJ MONON)”

- **SED, Kio estas la stenografio? .**
- **Ĝi estas sistemo por rapida skribado , pere de simboloj.**
- **En la mondo estas pluraj stenografiaj sistemoj: Pitman, Gregg, Larralde, TeeLine, etc.. Mi analizis pli da 15 sistemojn.**
- **Preskaŭ ĉiu sistemo havas la samajn du malfacilaĵojn:**
- **1) Oni devas lerni multe da reguloj**
- **2) Ili uzas dikajn kaj maldikajn liniojn (malfacile skribeblaj per globalkrajono)**

**Ĉi kurso uzas la aron da simboloj kreitaj/elpensitaj de Mirko Emeriko Marchetta , itala esperantisto , (1926-1996).**

**La originala sistemo , kies nomo estas “NOVA SKRIBO”, estis  iniciatita unue kaj speciale por la lingvo internacia ESPERANTO. Ĉi tie, mi faris etajn modifojn , ĉar mi ne volas parkeri multe da simboloj.  Ekzistas tri “niveloj” aŭ “ŝtupoj”. En tiu ĉi kurso ni lernos nur la unuan “nivelon”, kaj tio sufiĉos por duobligi nian skribo-rapidecon, tio signifas ke ni skribos duoble pli rapide ol antaŭe.**

# Kial la stenografio funkcias?

**Ni revidos malnovajn konceptojn pri FIZIKO:**

**LONGECO (spaco)**
**TEMPO (sekundoj, minutoj, horoj...)**

**RAPIDECO= longeco/tempo**

**komenco ------------------> fino**

**Ni observas ke por skribi la frazon:**

**“Hodiaŭ mi lernas stenografion” , ni uzas certan kvanton da spaco (longeco):**
**“---------------------------------- “**

**kaj per stenografio ni uzos:**

**“ ------------- “**

**kaj pro tio, malmulte da tempo kaj ni finfine pligrandigos la rapidecon.**

# Ni parolis pri tri niveloj aŭ ŝtupoj:


**1) po litero :  e-s-p-e-r-a-n-t-o**
**(same kiel en la presitaj literoj de libro)**


**2) po silaboj:  ste-no-gra-fi-o**
**(oni ligas, konektas la literojn)**


**3) plena skribado :  skribotablo**
**(oni ligas, konektas la silabojn)**

# Ek al la simboloj !!!


**Oni desegnas la simbolojn kun klinigo 60° rilate al la horizontala linio, pli malpli.**







a b c ĉ d e f g ĝ h ĥ i j ĵ
k l m n o p r s ŝ t u ŭ v z


# Vokaloj



# Konsonantoj




a b c ĉ d e f g ĝ h ĥ i j ĵ



k l m n o p r s ŝ t u ŭ v z

**Mi diris a vi ke mi modifis iomete la originalajn simbolojn, ĉar fakte mi estas pigra, mal-labor-ema, kaj ne volas parkeri multe da simboloj.**



Ho, mia kor’, ne batu maltrankvile,

El mia brusto nun ne saltu for!

Jam teni min ne povas mi facile,


Ho, mia kor’!

Ho, mia kor’! Post longa laborado

Ĉu mi ne venkos en decida hor’?

Sufiĉe! trankviliĝu de l’ batado,

Ho, mia kor’!



# Kiel komenci la praktikadon? Per simplaj kombinaĵoj.

**ba , be , bi, bo , bu**
**ĉa, ĉe, ĉi , ĉo , ĉu**
**ca, ce, ci , co , cu**
**da, de , di, do , du**
**fa , fe, fi , fo, fu**
**ga, ge, gi , go, gu ...**

**kaj tiel plu, ĝis la fino de la alfabeto.**
**(konsonantoj)**

**Poste, sekvos pli da simplaj kombinaĵoj.**
**aba , abe , abi, abo , abu**
**aca, ace, aci , aco , acu**
**aĉa, aĉe, aĉi , aĉo , aĉu**
**ada, ade , adi, ado , adu...**
**ĝis la fino de la alfabeto.....**

**Kaj ni ripetos la skvencon:**
**eba , ebe , ebi, ebo , ebu**
**eca, ece, eci , eco , ecu**
**eĉa, eĉe, eĉi , eĉo , eĉu**
**eda, ede , edi, edo , edu ....**
**ĝis la fino de la alfabeto.....**

# Sekve, ni tradukos simplajn vortojn:

**ĵurnalo ...................................................**

**Revuo .................................................**

**Leciono ..............................................**

**kuracisto ...........................................**

**koronviruso ......................................**

**Kongreso ............................................**

**Granda ..............................................**

**En granda kajero. (mi sugestas al vi aĉeti grandan kajeron)**


**Kaj laste, vi kopios kaj tradukos plenajn frazojn (t.e. longaj frazoj).**

**En la ĉambro estas kato.  La kato dormas.  La kato sidas sur  la seĝo.  La fontoplumo de Petro estas verda.  Maria kaj Petro amas la homaron. La stenografio donos al vi grandan plezuron.  Sofia aĉetis du kilogramojn de termopojn, kvar verdajn pomojn , kaj du kilogramojn da bananoj.**

# Ni jam menciis ke pere de la stenografio, ni ŝparas kaj tempon kaj monon.
# Ĉu estas ĉio?. Ne.  Ĉu estas io pli?. Jes, kaj temas pri la funkciado de la homa cerbo.

**Dekstra parto:**


**Procesas bildojn, simbolojn, grafikaĵojn, regas la maldekstran parton de la homa korpo. Abstrakta penso, artoj, molaj sciencoj kiel la filozofio,muziko, ktp. FLEKSEBLA**




**Maldekstra parto:**

**Procesas vortojn, regas la dekstran parton de la homa korpo. Logika penso. Matematika penso.Malmolaj sciencoj. Lingvoj. RIGIDA.**

**Pere de la stenografio (ne gravas la sistemon, kiun vi uzas!!) ni unueciĝas kiel personoj, kiel homaj estaĵoj , ligante ambaŭ “duon-sferojn” de nia homa cerbo. Ek-komencas aperi konektoj inter ambaŭ, antaŭe disigitaj, separitaj, partoj. Tiuj procesoj de kodigado-malkodigado havas ne-imageblajn rapidecojn.**



**kaj laste, sed ne pro tio malpli grava:**
**La stenografio oferos al vi “sekretan kodon”.**
**Vi trankvile skribos , sciante ke viaj apudaj rigardemul(in)oj (observantoj) , ne sukcesos kompreni viajn vortojn, pro la fakto ke ili ne konas la “kodigad- malkodigad- procesojn”.**

**https://novaskribo.weebly.com/**

**Prof. Ruben Sanchez**
**rubensan15@gmail.com**

**La vorto “LUDI” havas diversajn signifojn:**

**Ludi: amuziĝo, distriĝo .**
**Mi ludas ŝakon. Mi ludas kartojn.**

**Ludi: sporto . Mi ludas tenison.**
**Ludi: muziko . Mi ludas gitaron.**
**Ludi: muziko . Mi ludas kanzonon**

**Ludu laŭ viaj preferoj !!.**
**Ekzercu la cerbon !! (ĝi estas muskolo)**

# ”LUDU PER STENOGRAFIO (ŜPARU TEMPON KAJ MONON)”

# URBO ROSARIO
# 61-a AKE
# NOVEMBRO - 2021